

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 21.1.2013

Pastro ThDr. Jan Filip

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 23-an de januaro 2013

Jan Filip naskiĝis en urbo *Přibyslav* la 9-an de decembro 1911. Lia patro nomiĝis *František Filip* kaj estis teksisto, patrino *Františka*, naskita *Vlčková*, kiu devenis de vilaĝo *Špinov*, kromlukris plej ofte kiel agrokulturistino.

Jan havis kvar pli aĝajn gefratojn (du fratojn kaj du fratinojn) kaj unu pli junan fraton. Lia familio estis malriĉa, sed dank'al pastro *Alfons Hornek*, kiu eksciis talenton de knabo, *Jan* povis studadi. Kiam li finigis sian lernadon en bazlernejo de *Přibyslav* (1917-1923), li ekstudis en Ĉefepiskopa gimnazio en Prago-*Bubeneč* (1923-1931). Li havis grandan talenton por studado de lingvoj. Jam kiel studento li kontribuis en kelkajn ĵurnalojn, ekz. Novaĵoj de *Bubeneč* (*Zprávy z Bubence*). Ekde la jaro 1925 li redaktis esperantistan rubrikon de ĵurnalo *Floroj de juneco* (*Květy mláďí*) kaj de ĵurnalo *Nova nacio* (*Nový národ*). Krom tio li kontribuis en skoltan ĵurnalon *Antaŭen* (*Vpřed*). En tiu ĵurnalo li eĉ gvidis kurson de esperanto. Li uzadis skoltan kromnomon *Stepa lupu* (*Stepní vlk*).

Internacia Esperantista Asocio organizis konkurson pri la plej bela poemo pri *Virgulino Maria* en la dudekaj jaroj de la dudeka jarcento. La unua premio de tiu konkurso estis intence nur simbola – bukedo de blankaj rozoj, kiun venkonto de la konkurso devos meti al piedoj de statuo de *Virgulino Maria* en *Lurdoj*. Esperdona poeta komencanto el *Bohemia-Moravia Montetaro* venkis en tiu konkurso, sed ne povis forveturi en Francion. Lernejestraro ne liberigis lin de lernado kaj tial menciitan bukedon anstataŭ li metis al statuo de la *Patrino de la Dio* en *Lurdoj* du reprezentantoj de katolika esperantista klubo.

Jam dum studado *Jan Filip* ektradukis kaj ekkolektis popolajn kantojn. Lia kolektaĵo estis eldonita en la jaro 1929 kiel *Kantareto de Jan kaj Karel Filipoj*. Alia granda agado estis kompilado de *Granda vortaro ĉeĥa-esperanta*. Lia teatraĵo *Romo*, pri persekutado de kristanoj en antikva *Romo*, estis unufoje ludita en urba teatro de *Hradec Králové* en la jaro 1933. Sed *Jan Filip* verkis ankaŭ fiŝkaptistan komedion *Blanka fiŝeto* por sinjoro profesoro (1934).

Jan Filip post nefacila sed sukcesa studado en Episkopa seminario en *Hradec Králové* estis dum festo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo la 29-an de junio 1936 ordinaciita kiel sacerdoto. Kaj tuj en venonta dimanĉo post ordinacio, en la festo de Sanktaj Cirilo kaj Metodeo, la 5-an de julio 1936, juna nova pastro celebris en *Přibyslav* sian unuan sanktan meson. Invitilon por ambaŭ mesoj li printigis al si en ĉeĥa kaj esperantlingva versioj.

Vasteco de verkado de *Jan Filip* estas mirinda. Dum sia studado li krome esperanto ekposedis ankaŭ kelkajn aliajn fremdajn lingvojn – latinan, grekan, germanan kaj anglan lingvojn. Li verkis ne nur poemojn kaj rakontoj, sed fariĝis fama ankaŭ kiel aŭtoro de teatraĵoj kaj radiaj ludoj. Iam ili eĉ estis luditaj tuj post ilia finigado kaj en tio partoprenis elstaruloj de tiamaj muzika kaj drama vivoj.

Jan Filip ofte uzadis pseŭdonomojn. Krom jam menciita skolta kromnomo *Stepní vlk* (Stepa lup) li uzadis pseŭdonomojn *Václav Vlček*, *Václav M. Vlček* aŭ nur *V.M. Vlček*. Li tial esprimis sian amon al sia patrino, kiu havis fraŭlinan nomon *Vlčková*. Nomon *Václav* (Venceslao) li uzadis kiel memoron pri sia forpasinta frato.

Dank' al sia lingvistika verkaĵo *Jan Filip* fariĝis tiel konata en Eŭropo, ke li estis invitita al diversaj internaciaj esperantistaj agadoj. En julio kaj aŭgusto 1947 li faris prelegan rondvojaĝon trans Grandbritio kaj Irlando, kien li estis invitita ĉe rekomendo de ministrejo de eksteraj aferoj, kies estro tiam estis ministro *Jan Masaryk*, kaj ministrejo de informoj, kiun gvidis *Václav Kopecký*. En Grandbritio kaj Irlando li uzante esperanton kaj anglan lingvon proksimigis al aŭskultantoj historion, vivon kaj kulturon de Ĉeĥoslovakio. Dufoje li plenumis la saman devon en Nederlando kaj Belgio. Pro tio li estis laŭdita de niaj ŝtataj oficoj. Liaj prelegoj estis altiraj kaj li projekciis laŭtemajn filmojn.

Lia pastra kaj pedagoga laboro ne estis facila, ĉar li devis multfoje translokiĝi. Kiel pastro li laboris preskaŭ du jarojn en *Jičín* kaj *Nová Ves* super *Popelka*. Poste li fariĝis profesoro en *Kutná Hora*. Liaj aproboj estis religio, historio kaj latino. Li sekvis laborlokojn en *Dvůr Králové*, *Jičín* kaj *Náchod*. Dum sia laboro en lernejoj li latinigis plurajn popolajn kantojn kaj tiel plifaciligis studadon de latina lingvo al studentoj. Li ankaŭ kapablis tre rapidspite kaj trafe verki akompanajn tekstojn por lernejanaj prezentadoj, ĥoraj deklamadoj kaj teatraĵoj de siaj studentoj. Li multfoje surprizis homojn en sia proksimeco per spritaj kaj trafaj tekstoj okaze de diversaj vivjubileoj de elstaruloj aŭ okaze de signifaj datrevenoj de ekleziaj aŭ civitanaj eventoj.

Sed en la jaro 1950 *Jan Filip* jam ne ricevis permeson por laboro de pedagogo. Regantaj komunistoj ne volis toleri kredantan instruiston kaj *Filip* ne estis nur kredanto, sed ankaŭ romkatolika pastro, skolto kaj esperantisto. Tial *Jan Filip* denove eklaboris kiel pastro en *Přibyslav*, sed estis translokgita en vilaĝojn *Veliš*, *Chleny*, *Kostelec* super *Orlice* kaj *Kratonohy*.

Signifa estis laboro de pastro *Jan Filip* kun akolitoj kaj skoltoj, al kiuj li dediĉis multe da sia libera tempo.

Jan Filip estis tiom signifa kaj konata elstarulo ne nur en nia lando, sed ankaŭ eksterlande, ke oni ne povis denove kaj denove prokrasti lian teologan doktorigadon (por titolo *ThDr.*, doktoro de teologio, latine: *theologiae doctor*). Sed tio okazis en *Litoměřice* nur en la jaro 1963. Eble tio estis ankaŭ ia malfrua rekono de liaj teologaj, pedagogaj, sciencaj kaj artaj meritoj.

Eminenta svisa esperantistino kaj tradukistino *Madlen Welsh* vizitis lin en lia pastra domo en *Kratonohy* en la jaro 1968. Ŝi volis persone ekscii elstaran eŭropan esperantiston kaj aŭtoron de Granda esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta vortaro kaj aliaj verkaĵoj. En tiu tempo estis eldonitaj kaj luditaj en teatroj du teatraĵoj de *Filip*: *Turo en Nuboj (Věž v oblacích)* kaj *Fino de la Mondo (Konec světa)*.

Jan Filip verkis librojn *Floroj de juneco (Květy mládí)*, *Al majesta celo (Za vznešeným cílem)* kaj multe da rakontoj.

Pastro *Jan Filip* finigis sian vivan iradon en festo de la Jesuo Kristo la Reĝo dimanĉe la 21-an de novembro 1971. Li preparis sin por celebrado de la sankta meso, kiel ĉiutage. Morto atingis lin en sakristio de preĝejo de Sankta Jakobo la Pli Aĝa en *Kratonohy*, kiam li vestiĝis en sian mesrobon. Tio estis nur 18 tagoj antaŭ lia 60-a naskiĝtago, kiun li solenus la 9-an de decembro 1971. En ĵaŭdo, la 25-an de novembro 1971, matene ĉiuj paroĥanoj de *Kratonohy* kaj vasta ĉirkaŭaĵo adiaŭis lin. Poste li estis, laŭ sia deziro, transveturigita en *Přibyslav-on*, kie je la unu kaj duono de horo posttagmeze okazis entombejo, kaj post ekleziaj funebraj ceremonioj li estis entombigita en loka tombejo. Estis pluvmalvarma novembra tago, ĉie kuŝis multe da neĝo, sed spite de tio lin dum lia lasta vojo akompanis multe da amikoj, konatuloj, kredantoj, elstaruloj de eklezia kaj civitana vivoj. Vane tiamaj komunistaj oficoj intence decidis, ke la entombejo devis okazi posttagmeze en labortago. Ĉiuj, kiuj lin sciis, volis esprimi al li iliajn estimon, rekonon kaj dankon por liaj tutvivaj moralaj vidpunktoj kaj lingvistika kaj literatura verkadoj.